

Peter Paulsen,  
La sekreta gefianĉa paro

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Malgranda rakonto el la tempo, kiam Avinjo estis fianĉino.

Min hart as din, an dü beest min,  
swet hiamelkhaid as min an din,  
wi brük diartu nian freemen.  
Jä, swet as't, wan't noch hiamelk as,  
wi tau alian, wi witj at was,  
an ölers witj at neemen.

Tion skribis antaŭ multaj jaroj Stine Andresen. Sed granda feliĉo per “dolĉa sekreteco” ja estas pasinta, kiel multaj aliaj malnovaj frisaj moroj.

Komence de tiu ĉi jarcento estis ankoraŭ la kutimo sur nia malgranda insulo, ke el ĉiu domo almenaŭ unu persono dimanĉe iris al la preĝejo. Kaj kiam ĉiuj post la diservo sidis kune ĉe la tagmanĝo, oni rakontis tion, kion la pastro sur la predika pupitro estis dirinta; ĉu estis preĝinte por iu aŭ ĉu estis avizinta iu geedziĝo. Antaŭ la preĝeja pordo, kie la viroj foje ankoraŭ staris momenton por interparoli, oni aŭdis ĉiam la plej novajn aferojn. La virinoj, kiuj iris kune al la preĝejo, eksciis sur la hejmen-irado pli ol el la gazeto.

*Traduko de la Frisa poemo “Det hiamelk bridjpaar” de PETER PAULSEN (\*1893-11-18 – †1976-10-12) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-106-214 (2003-12-22 22:17:32)*